

# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Jaro 40-a BRAZILIO, OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO 2016 N-ro 164

“Amu vian Dion per via tuta koro  
kaj per via tuta animo kaj per via tuta  
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”  
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte  
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”  
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.*  
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante  
unu la alian, la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondon familian.”  
ZAMENHOF. *La Espero.*

## KIA TRE BELA FESTO!

**L**a 10-an de decembro, Eldonejo Lorenz kompletigis sian 41-an datrevenon en bela festo ĉe Brazila Spiritisma Federacio, en Rio-de-Ĵaneiro. Pli ol 60 geesperantistoj ĉeestis la eventon. La programo estis tre riĉa: tuj post la komenca preĝo, Affonso Soares, prezidanto de la Konsilantaro de Lorenz, prezentis la Retrospektivon 2016 de nia Eldonejo, reliefigante la ĵus kreitan Fonduson por eldoni kaj ekspedi spiritismajn librojn, tute senpage, al la tuta mondo.

Tuj post, la veteranaj prelegantoj, Alberto Flores kaj Benedicto Silva, paroladis pri tre interesaj kaj kuziozaj ekspertoj koncerne Esperanton. La ĉeestantoj varme ilin aplaudis.

Tuj post la paroladoj de la veteranoj, la geedzoj Nilson kaj Neli Bulhões bele kantis tri kanzonojn; inkluzive, La Rozoj Silentas, de la brazila komponisto Cartola, en Esperanto.

Alia interesa detalo estis la ĉeesto de samideanoj el diversaj regionoj: São José do Rio Preto, Juiz de Fora, Brasília, São Paulo kaj Bolivio.



Benedicto Silva prelegas



Neli kaj Nilson kantas

Ni pliatentigas ke, en ĉi-evento, Eldonejo Lorenz lanĉis la libron “LA VIVO EN LA NEVIDATA MONDO”, detala priskribo de la postmorta vivo, ricevita medieme de Anthony Borgia, diktita de Monsinjoro Robert Hug Benson, kaj tradukita el la angla lingvo de la eminenta Aŭstralia esperantisto Trevor Stelle. Se la eksterbrazilaj samideanoj volos ĝin ricevi, tute senpage, skribu al ni.

Post la fina preĝo, la gvidanto de la Kunveno, Ismael Miranda, invitis ĉiujn por la tradicia bongusta lunĉo.

**Ĝis la proksima jaro!**





Paulo Sergio Viana

Ĉinnumero de KOMUNIKOJ omaĝas la bonkoran kaj senlacan brazilan kuraciston Paulo Sergio Viana, ano kaj konstanta kunlaboranto de nia Eldonejo.

Paulo estas aktiva preleganto kaj kompetenta tradukisto en Esperanto; inkluzive, premiita en konkursoj de Universala Esperanto-Asocio.

Koran dankon, Paulo, pro via fekunda laborado por la triobla idealo!

Karaj gelegantoj,

Ĉe la fino de plia labor-riĉa jaro por la unuiĝo, kulturo kaj informiĝo inter ĉiu popoloj kaj nacioj de la mondo, Eldonejo Lorenz alportas al vi plian numeron de “Komunikoj”, plenan je novaĵoj, omaĝoj kaj klarigaj artikoloj pri Esperanto kaj Spiritismo.

Ĉi-eldone, resume kaj unuapaĝe, elstaras la festo, celebranta la 41-jaran laboradon de Eldonejo Lorenz. Temis pri renkontiĝo plena je ĝojo kaj kunfratiĝo inter ĝiaj kunlaborantoj, nelacigeblaj porlaborantoj de la bono.

Ni esperas, ke, laŭpaŝe de la legado, vi renoviĝos kaj sentos vin motivita ankaŭ preni parton en tiu konstanta laboro, sendepende de la loko, en kiu vi troviĝas.

**Bonan legadon kaj feliĉan 2017!**

## NI REKOMENDAS Portalo Spiritismo ĉe Vikipedio La libera enciklopedio

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Portalo:\\_Spiritismo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Portalo:_Spiritismo)



## SENPAĜAJ LIBROJ...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)

### LORENZ

#### “KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 40-a – n-ro 164 | Oktobro-Novembro-Decembero 2016

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj  
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

#### KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz  
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal  
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)  
Telefonoj: + 55-21-2221-2269 - + 55-21-2450-4768  
Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)  
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>



Kompostita de Rogério Mota

# Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



Al Majnov, 1887

Estimata sinjoro!

Respondo je via demando kaj konsilo vi trovos en la verketo "Respondoj al la Societo", kiu estos eldonita post 4-5 semajnoj. Je ĉiu okazo mi dankas vin kore por via bona volo.

Kun estimo Esperanto

Al Majnov, 1887

Estimata sinjoro!

Respondante vian leteron, mi povas vin sciigi, ke la ĵurnalo komencos eliri kredeble ĉirkaŭ la monato Januaro aŭ Februaro de la jaro 1888, sed certe diri mi ankoraŭ ne povas, ĉar mi ankoraŭ devas nun labori ke la registaro donu al mi la permeson. La plena vortaro jam estas preta, sed ĝi eliros kredeble ne tiel baldaŭ. Kian la gazeto komencos eliri, mi donos en ĝi respondojn de ĉiuj demandoj de la legantoj; en tiu gazeto estos preparolata ĉio, kio estas necesa por la lingvo internacia\*.

\* ĉi tiu kaj la antaŭa letero al Majnov estas ankoraŭ skribitaj kun streketoj, kiuj disigas la vortelementojn.

Al Majnov, 1887

Estimata sinjoro!

La germana eldono ankoraŭ ne estas preta. Ĝi eliros post du semajnoj, kaj vi povos ĝin ricevi ĉe la plej gravaj libristoj en St. Peterburgo. Vi povos ĝin ricevi ankaŭ ĉe mi mem, sendinte 25 kopekojn (per markoj de poŝto).

## ASOCIO DE ESPERANTISTOJ- HANDIKAPULOJ EN PARDUBICE

elkore invitas vin al

### LA 7-A INTERNACIA KONGRESO DE AEH,

kiu realiĝos en Rekrea centro Zámeček (Kasteleto) en Hodonín ĉe Kunštát en la tagoj de 21-a ĝis la 23-a aprilo 2017 kun sekvanta lingva seminario ĝis 28-a de aprilo 2017.

La Rekrea centro Zámeček estas plene senbariera kun liftoj, sociaj salonoj kaj gimnastikejo. La tranoktado estas en 2- ĝis 4 litaj ĉambroj kun lavujo. Necesejoj kaj duŝoj estas en koridoroj.

Temo de la kongreso: tolero – limo de tolero – interhomaj rilatoj

Ni proklamas literaturan konkurson al tiu ĉi temo, la plej bonaj artikoloj estos traigitaj dum la kongreso, publikigitaj en informilo kaj premiotaj pere de libro. Vian laboron sendu ĝis la fino de februaro 2017 en dimensio de unu paĝo A4.

Devigan aliĝilon por la 7-a kongreso de AEH sendu al la redakcio en Pardubice per poŝto aŭ elektronike (e-mail) plej malfrue ĝis la 15-a de februaro 2017. Vi pagos surloke (preparu monon - ne porpagan karton).

Adreso de la redakcio:

Asocio de E-handikapuloj,

Na Okrouhlíku 953/21, CZ 530 03 Pardubice,

Ĉeĥa Respubliko

Retadreso: [aeh@esperanto-aeh.eu](mailto:aeh@esperanto-aeh.eu)





**KUNLABORU!** – Membro de ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

**COLABORE!** – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

**E**ldonejo Lorenz lanĉis la libron “**LA VIVO EN LA NEVIDATA MONDO**”, en decembro de 2016. Ĝi estas detala priskribo de la postmorta vivo, ricevita medieme de Anthony Borgia, diktita de Monsinjoro Robert Hug Benson, kaj tradukita el la angla lingvo de Trevor Stelle.

Se la eksterbrazilaj samideanoj volos ĝin ricevi, tute senpage, skribu al Eldonejo Lorenz ([editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)).



JOÃO SANTOS, ano de nia Eldonejo, liveras la ĵus lanĉitan libron, “**Post la morto**”, de la franca filozofa LÉON DENIS, al la aŭstralia samideano TREVOR STELLE, dum la UK en Nitra, Slovakio.

**Karaj gelegantoj, se vi ankaŭ volos ĝin ricevi, tute senpage, skribu al ni. Kun granda ĝojo ni ĝin sendos al vi.**



## ĈU VI ANKORAŬ NE REALIĜIS POR 2017?

**S**e vi ankoraŭ ne realiĝis, ne forgesu ke via jara kontribuo treege helpas nin eldoni spiritismajn verkojn en Esperanto kaj ilin sendi, tute senpage, al niaj eksterlandaj samideanoj.

Kaj vi, kara amiko, kiu neniam aliĝis, petu informojn kaj kun granda plezuro ni vin sciigos pri la laboro de nia Eldonejo kaj kion vi, kiel nia ano, ricevos en la komforto de via domo.

Skribu al ni: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)

(21) 99058-4028 (ZAP)

(21) 2452-9039 / 2450-4768



**L**aŭ mia modesta opinio, Ismael Gomes Braga estis la plej fervora batalanto por Esperanto en Brazilo. Li intense laboradis por nia idealo 60 jarojn. Esperantisto de 1907, Ismael neniam ŝparis penon kiel propagandisto, kursgvidanto, verkinto de centoj da artikoloj kaj dekoj da libroj. Li verkis inkluzive “Veterano?”, kiu estas la unua libro verkita en Esperanto en Brazilo, en stilo simpla kaj flua.

Miloj da homoj en nia lando lernis kaj sciis pri Esperanto pere de libroj verkitaj kaj eldonitaj de Ismael.

Ismael Gomes Braga naskiĝis en la bieneto Braguinha en Córrego Alegre, proksime de Ubá, ŝtato Minas Gerais, la 14-an de julio de 1891, kaj lia koro ĉesis bati la 18-an de januaro de 1969, en Rio-de-Ĵanejro.

Homo tre amata de la esperantistaro, li amikiĝis kun samideanoj el ĉiuj kontinentoj, kaj grandega estis lia korespondado kun materialistoj, ateistoj kaj membroj de pluraj religioj.

Ismael sindediĉis ankaŭ al Spiritismo, kiun li ĝisfunde studis, farante gigantan laboron en tiu kampo.

La maljuna esperantisto Amarílio Hévia de Carvalho, kiu loĝas en Barra do Garças, ŝtato Mato Grosso, konis persone la majstron Ismael, en Rio-de-Ĵanejro, kaj skribis al mi la 29-an de oktobro de 2015: “Plurfoje mi havis plezuron dialogeti kun Ismael. Li estis giganta kaj humila homo, kaj kelkfoje petis de mi revizii la pres-erarojn de liaj verkoj. Nenion mi trovis korektendan, kredo, ĉar profesoro Ismael estis geniulo.”

Krom Esperanto kaj portugala, la klera Ismael lernis aliajn lingvojn, nome latinan, italan, anglan, hispanan, hebrean, araban, rusan, nederlandan kaj grekan.

Ismael vere posedis mirindan memoron. Pri tio informas Zêus Wantuil en la libreto “Ísmael Gomes Braga”, eldonita de Brazila Spiritisma Federacio: “Dotite per bomega memoro, li iam kaj iam recitadis por siaj amikoj kaj parencoj longegajn tekstojn de Victor Hugo, Chateaubriand, Descartes, Moliero, Maeterlink, Balzak kaj aliaj eminentaj verkistoj.”

Zêus informas plu: “Li ŝatis parkere reciti en la originalaj idiomoj tutajn tekstojn de la verko “Dia komedio”, de Dante,

kaj de libroj de Ŝekspiro, Ovidio, Vergilio, Homero kaj aliaj grandaj verkistoj el la antikveco.”

Pliaj klarigoj de Zêus Wantuil: “Havante grandan facilecon skribi, li laŭkutime enmetis paperon en sia skribmaŝino kaj post nelonge estis preta la petita artikolo. Li malofte faris konsulton por rememori ĉi tiun aŭ tiun parton de la afero pri kiu li interesiĝis. Li parkere sciis tekstojn kaj tekstojn el verkoj en portugala kaj fremdaj lingvoj kaj sciis ilin uzi en la ĝustaj tempo kaj loko.”

Ankaŭ Noraldino de Melo Castro atestas pri la eksterordinara memoro de Ismael en la gazeto “O espírito mineiro”, n-ro 172, majo/julio de 1977. Jen la fakto: la 18-an de aprilo de 1943, vespere, sub hela lunlumo, en Pedro Leopoldo, ŝtato Minas Gerais, Ismael Gomes Braga, la famkonata mediumo Chico Xavier kaj Noraldino de Mello Castro promenadis tra la urbo kaj apud la rivereto “Aube”, ili restis kelkan tempon. En tiu momento, Ismael deklamis pecojn de la “Dia komedio” en itala lingvo, kaj tuj poste tradukis kaj faris komentariojn pri tiu gravega verko.

En nekrologo aperinta en Brazila Esperantisto, majo/aŭgusto de 1969, oni povas legi la jenon: “Li amis deklami parkere en la originalo tutajn pecojn de ĉefverkoj kiaj ‘Dia komedio’, teatraĵo de Shakespeare, poeziaĵo de Ovidio, Virgilio, Homero kaj de aliaj grandaj antikvaj verkistoj.”

La memorkapablo kaj aliaj kvalitoj de Ismael Gomes Braga pruvas ke li ne estis ordinara esperantisto, nek ordinara homo.



Ismael Gomes Braga (Fonto: Wikipedio)

## ESPERANTO-KUNFRATIĜO EN OKCIDENTA REGIONO KAJ PROJEKTO ESPERANTO POR LA PUBLIKO EN LA MUZEO DE LA MORGAŬO (RIO-DE-JANEIRO - BRAZILIO)



**L**a Muzeo de la Morgaŭo estis konstruita en la urbo Rio-de-Janeiro (ŝtato Rio-de-Janeiro, Brazilo). La projekto estas de la hispana arkitekto Santiago Calatrava, kaj ĝi estis starigita apud placo Mauá.

La institucio estas loko de artoj kaj sciencoj, kaj havas spektaklojn kiuj avertas pri la danĝeroj de klimata ŝanĝo, media degenero kaj socia kolapso.

***Estu ni sentimaj, la triumfo apartenas al tiuj, kiuj plej kuraĝas.***

*Charles Chaplin*

